Tamen Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, JANUARO 2009, JARKOLEKTO 27
Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019
esperantobob@iprimus.com.au
Legeblas ankaŭ surrete: www.gazetejo.org

Iun vintran matenon Avo sin vestis. Rigardis lin lia nepo, kies okuloj multe pligrandiĝis vidante la longan subpantalonon.

"Ho, Avo, mi ne sciis, ke vi estas baleddancisto."

Jarfina raporteto en ciferoj pri nia klubo verkita de Katja

En 2008 vizitadis niajn kunvenojn: Bob kaj Audrey Felby, Trevor kaj Katja Steele, Indrani Beharry-Lall, Brendan kaj Carol Linnane, Dan Ehlers kaj lia neesperantista edzino Ashika, Margaret Furness, Sandor Horvath, Helene Palmer, Pat Palmer, Eileen Jones, Finnur Larusson, Nancy Roy, Arturo kaj Libby Mortimer. Du fojojn venis Rochelle Jacquier kaj ŝia neesperantista edzo Max. Tri fojojn venis Miĥaelo Holland. Entute 21 personoj. Niaj membrokotizoj estis: $ 35,00 por salajrata persono, $ 25,00 por pensiulo, $ 40,00 por familio, $ 30,00 por pensiula familio kaj $ 10,00 por junuloj.

Ni kunvenis en nia kutima klubejo en Clarence Park unu fojon ĉiun monaton. Escepto estis oktobro, kiam ni klubumis en la hejmo de la Gesteeloj. Ni ne kunvenis januare. Entute 11 kunvenoj.

Apartaj programoj estis: aprile teatrumado ĉe Pat, maje renkontiĝo kun la nova prezidantino de AEA Dianne Lukes, junie ekskurso al Price, julie vizito al la adelajda malliberejo, aŭguste ekskurso al la marmuzeo en Port Adelaide, oktobre ni iris al la bestoĝardeno Monarto ĉe Mount Barker, oktobre ni kantis ĉe Indrani kaj decembre ni festis la Zamenhof-tagon ankaŭ en la hejmo de Indrani. Entute 8 okazoj.

Nia kluba bulteno Tamen Plu, redaktata de Bob Felby, regule aperadis ĉiun monaton. Entute 12 numeroj.

Kroma aktivaĵo estis la sendo de porarĥivaj numeroj de Tamen Plu al CDELI en Svislando kaj al la Esperanto-muzeo en Vieno. Ni produktis 500 bildkartojn, kun la temo de aŭstraliaj verkistoj. Kelkaj rakontetoj de Trevor estis dissenditaj de la 3zzz-radio-elsendo.

En nia kaso estis jarfine $ 834,00. Nia kapitalo estis investita en du lokoj: ĉe ESANDA kaj Ethical investment. Ĉe ESANDA ni deponis $ 4.000,00 kaj ĉijare ni ricevis interezon $ 238,00. Tiun ni uzis por la ĝeneralaj elspezoj. En Ethical Investment estas $ 5.000,00 kaj ĝia interezo reiras al la konto. Fine de julio ni havis tie $ 5.850,00. En la sama periodo antaŭ unu jaro la saldo estis $ 6.500,00, la negativan evoluon kaŭzis la financa krizo de la lando.

Dum la tuta jaro ni enmetadis po kelkajn monerojn en nian donackason. La finan sumon $ 203,00 ni aldonis al la $ 400,00 kiujn kunmetis 6 kromaj donacintoj kaj sendis la tuton al Oliver Mazodze, zimbabva esperantisto.

Nian kolekton da uzitaj poŝtmarkoj ni vendis kontraŭ $ 10,00.

La prifinancaj dokumentoj estas ĉe Indrani, la taglibro pri nia aktiveco kaj arĥivaj numeroj de Tamen Plu estas prizorgataj de Katja.

”Nu, ne diru al mia edzino, ke mi pruntеprenis monon de vi!”

”Ne kompreneble ne, kaj vi ne diru al mia edzino, ke mi havas tiom da mono, ke mi povas pruntedoni al vi!”

La 149-an naskiĝtagon de L.L. Zamenhof

ni celebris en la belega, nova hejmo de Indrani la 14an de decembro. Entute partoprenis 18 personoj inkluzive la ĉefrabenon de Aŭstralazio kaj lian ĉarman edzinon.

Solenan festparoladon faris Trevor i.a. pri la ido de Esperanto, Ido. Tio estis tre interesa. Poste kelkaj gesamideanoj kontribuis al la distrado per malpli seriozaj poemoj, dialogoj ktp.

Ni manĝis abunde, komune kantis laŭ la pianmuziko de Indrani kaj la mandolinbanĝomuziko de Bob. Do konklude mi povas diri nur, ke la festo estis eĉ tre bonega.

Nova pribesta libro en Esperanto

Ĵus la moskva eldonejo "Impeto" en la serio "familia biblioteko" aperigis novan scienc-popularan libron: Ilustrita enciklopedio pri hejmaj mamuloj. Kompilis ĝin Nikolao Gudskov. Moskvo, "Impeto", 2008. 240 paĝoj. ISBN 978-5-7161-091-3.

La verko, havanta belan kovrilon, priskribas ĉirkaŭ 50 speciojn de mamuloj el diversaj ordoj kaj familioj, kiuj pli-malpli ofte renkonteblas en hejmoj kiel dorlotbestoj. I.a. trovigas en ĝi ankaŭ priskriboj pri ĉirkaŭ 50 hundorasoj kaj pli ol 20 rasoj de katoj. Menciita estas ankaŭ nia populara Esperanta "Rondo Kato-Katamikaro", kiel ankaŭ ĝia populara sekretariino Ingrid Näsholm.

La verko priskribas la karakterizojn, konduton kaj kondiĉojn de hejma tenado. Ankaŭ pri malsanoj, zoohigieno, bredado ktp. oni legos.

Nigraj-blankaj ilustraĵoj akompanas la priskribon de la bestoj. Esperantaj nomoj estas provizitaj el la scienca latina. Troviĝas ankaŭ iliaj nomoj en la angla, franca, germana kaj rusa lingvoj. Fine de la libro troviĝas indeksoj en tiuj lingvoj kaj tabelo kun iuj biologiaj karakterizoj de la priskribitaj bestoj.

La prezo de la libro estas ĝis nun nekonata.

Edukado

Se vi vere deziras lerni kiel senerare – kaj senpene – uzadi nian belegan lingvon, tiam trastudu, pli ol nur unu fojon, "Lingvaj Resondoj", la elstaran verkon de nia eminenta Marcelo Leereveld. Lian verkon mendu ĉe 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur $ 23,00!

Li fariĝis patro la dekan fojon.

”Ne”, diras li al sia edzino. ”Tio sufiĉas. Ekde hodiaŭ mi kuŝigas min sur la plankon en la sidoĉambro”.

”Jes, ankaŭ mi faros tion, se vi kredas, ke tio helpas!”

Mummy, why can’t we all speak the same language”

La bona libro “Mummy, why can’t we all speak the same language?” aĉeteblas de Nicole Else, 1/359 Pacific Highway, Asquith NSW 2077, aŭ perrete Nicole@cryogenic.net kontraŭ $ 6,95 plus afranko $ 1,95. Ĝi estas angle verkita kaj celas ĉefe infanojn proksimume 10-jarajn.

Eniris ŝejko en artaĵvendejon. Li aĉetis du pentraĵojn pentritajn de van Gogh kaj ses pentritajn de Pikaso.

”Tre belegajn kristnaskodonacaĵojn vi donos ĉijare”, diris la ĝojega artaĵvendisto.

”Ĉu kristnaskodonacaĵoj?” diris la ŝejko. ”Tiujn ĉi mi uzos kiel kristnaskokartojn!”

Gravaj Esperanto-eventoj:

Esperanto en Sudaŭstralio iomete ripozos dum januaro, sed rekomencos sian agadon en februaro.
Merkredon la 4an de februaro ni renkontiĝos en Clarence Park je la 18a horo.
De la 11a ĝis la 25a de januaro 2009 la Somerkursaro de Aŭstralia Esperanto-Asocio okazos en ”International House”, 96 City Road, Chippendale, NSK 2008, en la belega urbego Sidnejo.
En februaro ni vizitos la rozĝardenon en Garrick Hill.
En marto ni prenos parton en la kajtofestivalo kaj boatekskurso en Adelajdhaveno.
En aprilo ni teatrumos ĉe Pat.
En majo ni vizitos la mangloarbaron en Sankta Kilda.
La 94a Universala Esperanto-Kongreso okazos de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 2009 en la belega urbo Bjalistoko, Polujo.
En 2010 la Universala Esperanto-Kongreso okazos refoje en la belega urbo Havano, Kubao.

”Kiom longe ankoraŭ daŭros plenigi la salujon?”

”Sed plej kara edzineto. Vi tute ne scias kiom longe daŭras enigi la salerojn tra tiuj ĉi tre malgrandaj truetoj!”

Korespondantojn serĉas

Miĥaelo Holland, 55-jara junulo serĉas gekorespondantojn el la tuta mondo, inkluzive Aŭstralion. Miĥaelo korespondas nur helikpoŝte. Li prefere korespondos kun iuj, kiuj parolas Esperanton jam dek jarojn kaj tial povos helpi lin pri la lingvo. Krom psikoanalizado kaj la Aleksandro-Teĥniko liaj interesoj estas ĉion faradi laŭsisteme.
Bonvolu skribi al: Miĥaelo Holland, Flat 90, 328 Fullarton Road, Fullarton, S.A. 5063, Aŭstralio.

Subite vidis komandulo aron da soldatoj. Ili ekmarŝis sur ponton, sub kiu fluis rivero.

“He, he”, li kriegis tiom laŭte, kiom liaj pulmoj permesis – fakte li ĉiam kriegis laŭtege, li estis ja komandemulo, kaj fieris pri tio – “Vi ne povas transiri tiun ponton, vi devas imagi, ke la malamiko eksplodigis ĝin!”

“Tio ne gravas”, respondis unu el la soldatoj. “Ni imagas, ke ni naĝas sub ĝi!”

39a Internacia Vegetarana Kongreso

La 39a Internacia Vegetarana Kongreso okazos en Ĝakarto kaj Balio, Indonezio de la 1a ĝis la 7a de oktobro 2010.

Tiu kongreso, organizita de International Vegetarian Union kaj la aktiva Indonezia Vegetarana Societo atendas 6000 vegetaranojn el la tuta mondo, la plej multaj el Indonezio. Nia ĉeestado kaj laborado tie povus do doni grandan puŝon al la momente malgranda esperantistaro en Indonezio. De la ĉeforganizanto, Susianto Tseng, ni jam ricevis permeson pri budo en la kongreso, kaj jam

komenciĝis kontaktoj kun indoneziaj esperantistoj en la regiono, kaj kun la Aŭstralia Esperanto-Asocio, kiu povus eventuale kunlabori. Ni bezonos ĉiuspecan helpon kaj subtenon por realigi nian revon ĉeesti tiun kongreson sufiĉe multnombre por instrui al ĉiuj interesitoj. Tiuj, kiuj ne povos ĉeeste helpi nin, eble trovos ĉi tiun planon finance subteninda. Se vi havas demandojn pri tio, kiel fari tion, kontaktu la kasiston aŭ la sekretarion. Kiam vi ĝiros monon por tiu ĉi celo, bonvolu mencii tion ĉe via pago. Ni kore antaŭdankas vin!

Provizora programo troveblas anglalingve ĉe http://www.ivu.org/congress/2010.

Heidi Goes, Assebroeklaan 2, B-8310 Bruĝo, Belgujo

"Diru al mi kelnero, ĉu ĉi tiu salato ne estas por du personoj?"

"Jes, certe sinjoro".

"Sed ĝi enhavas ja nur unu helikon!"

Pasporta Servo iĝas reta, sed ne nur

Unu el la plej popularaj servoj en Esperantujo nun faras grandan paŝon en la retan mondon. Post funkciigo de nova administra sistemo la gastigantoj de Pasporta Servo povos ne nur aliĝi al la servo rete, sed ankaŭ rekte prilabori la informojn pri si mem. Samtempe, post 15-jara laboro, Derk Ederveen nun transdonos la administradon de Pasporta Servo al nova generacio.

Vere ne estis facila periodo, ĉar Pasporta Servo iomete fariĝis mia infano. Sed estas pluraj kialoj por transdoni la laboron ĝuste nun. Ekz-e mi planas translokiĝi dum la venontaj monatoj, do ĉiukaze necesos paperpoŝta adresŝanĝo. Krome mi lastatempe havas malpli da libera tempo. Fakte ankaŭ ekmankas al mi energio kaj entuziasmo. Sed plej grave estas, ke enkonduko de nova administra sistemo estas perfekta momento por transdono. Postsekvanto havos la eblecon aranĝi la administran laboron laŭ sia plaĉo, Derk Ederveen klarigas en retmesaĝo.

Pasporta Servo, la reto de gastigantoj, prizorgatas deTutmonda Esperantista Junulara Organizo TEJO, la junulara sekcio de UEA. Miloj da esperantistoj jam dum pli ol tridek jaroj uzas Pasportan Servon kaj rakontas pri ĝi al neesperantistoj por konvinki ilin pri la utilo de Esperanto.

La ideo pri vere esperantista gastiga reto naskiĝis meze de la 1960-aj jaroj, unue kun la nomo ”Programo Pasporto”. La unua listo de gastigantoj aperis en 1974. Ĝi enhavis 39 gastigantojn el 19 landoj. En la sekva jaro estis jam 100 gastigantoj el 33 landoj, kaj en 1978 oni atingis 297 gastigantojn en 41 landoj.

La pasintjara listo havis 1.225 gastigantojn en entute 90 landoj. Tamen tiun jaron multaj el la gastigantoj pro poŝtaj problemoj tute ne ricevis la presitan liston.

Estas malagrabla koincido, ke ĝuste en la forsendo de la tiujara eldono, por la unua fojo en la redaktista periodo de Derk, okazis gravaj problemoj: iom post iom evidentiĝis ke multaj, verŝajne eĉ la plimulto el la gstigantoj de PS ne ricevis siajn ekzemplerojn. Plej verŝajne la problemo okazis en la poŝta dissendoĉeno, sed malgraŭ sinceraj klopodoj ni ne sukcesis retrovi la perditajn ekzemplerojn. Ni esperas je la komprenemo kaj fidas je la fideleco de niaj gastigantoj, kiuj ĉijare ricevos siajn ekzemplerojn kiel kutime, rakontas Gregor Hinker, prezidanto de TEJO.

Gregor Hinker aparte dankas al Derk Ederveen, ĉar dum lia longa, volontula administrado Pasporta Servo ne nur aperis fidinde kaj regule, sed spertis dum multaj jaroj ankaŭ daŭran kreskon, kaj samtempe estis forigita la financa deficito.

Kiel nova administranto ekfunkcios nun alia nederlandano, Joop Kiefte, studento pri informatiko, rakontas Gregor Hinker.

Libera Folio: Ĉu oni do tamen daŭre serĉas konstantan kunordiganton de Pasporta Servo, kiel lastatempe TEJO anoncis?

Ne, ĉar almenaŭ dum la transira periodo Joop Kiefte estas kunordiganto. La nova sistemo unuflanke reduktos la necesan redaktadon, ĉar la gastigantoj povos (sed ne devas)

mem rete prilabori siajn datenojn. Aliflanke ĝi permesos facilan prilaboron de pli ol unu redaktanto. Ni alstrebas post la sistemtransiro havi teamon da PS-kompilantoj.

Por modernigi Pasportan Servon TEJO anoncis konkurson por programistoj kaj ricevis entute kvin proponojn pri nova administra sistemo. La estraro de TEJO elektis la proponon de Joan Catala el Katalunujo.

Lia koncepto baziĝas je publik-liberfonta enhavmastruma sistemo Drupalo, kaj promesas unuflanke pli efikan kaj facilan redaktadon, aliflanke multajn avantaĝojn por la uzantoj. PS 2009 aperos ĝustatempe por la somera vojaĝsezono en la norda hemisfero. Krom la nova reta versio daŭre pluaperos la papera eldono. La eldonado de la PS-libreto laŭ nia konvinko estas ne nur tradicio, sed grava parto de la idearo de PS: ĝi uzatas sendepende de aĝo, lingvo, nacio, kaj same sendepende de aliro al la reto.
El: Libera Folio. Mankas la retadreso, sed ĝi plej verŝajne estas http://www.tejo.org/eo/ps_mapoj.

Nun permesu al mi rakonti iomete pri la ulo, kiu ĵus aĉetis motorbiciklon kun kromĉaro. Kiam li la unuan fojon volis provveturigi ĝin, li invitis sian balbutantan amikon kuniri en la kromĉaro. La amiko sin sidigis en la kromĉaro, kaj la ulo startigis la motorbiciklon. Baldaŭ ili veturis 25 km hore kaj la amiko balbutis: ”Di-di-di-di-di...”

”Ho”, pensis la ulo, ”li volas, ke mi veturigu ĝin eĉ pli rapide”. Baldaŭ ili veturis 50 km hore, kaj refoje la amiko balbutis: “Di-di-di-di-di...”

”Ho, bone”, pensis la ulo. “Li volas ke mi veturigi ĝin eĉ iom pli rapide”. Kaj la motorbiciklo veturis kiom eble plej rapidege, eble 100 km hore, mi ne plu memoras, kaj ankaŭ, pro la terura rapideco, ne plu balbutas !

Kelkajn horojn poste la benzinujo estis malplena. La ulo veturigis ĝin en benzinvendejon por aĉeti pli da benzino. Kiam li haltigis la motorbiciklon apud la benzinpumpilo, la amiko profunde elspiris kaj diris: ”Di-di-di-di-diable, est-est-estas ne-ne-ne-neniu pla-pla-planko en la kro-kro-kro-kromĉaro!”